

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 23-an de februaro 2017 per Skype.

(Protokolo aprobata la 30-an de marto 2017)

Partoprenis:

Anne Karin Bondhus en Bryne
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Mario Machlik en Tromsø
Herman Ranæs en Trondheim

0. Tagordo

Aprobata.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 12-an de januaro

Aprobata.

2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio: Skagen Vekst kr 55 991,- (54 947,-) Skagen Høyrente kr 130 625,- (130 360,-).

3. Landa Kunveno

Nun ĉiuj detaloj pri la aliĝo al la kongreso estas pretaj, kaj aperontaj en Norvega Esperantisto. Ni diskutis kandidatojn, kiujn ni povus inviti kiel gastojn al la kongreso. Du nomoj menciigis : Annie Grente kaj Kalle Kniivilä. Tio estus preferinde se la gastoj povus kontribui al la programo en formo de prelego, diskutrondo aŭ io simila. Ili ne pagu kongresan kotizon, sed verŝajne iliajn aliajn kostojn ni ne povus kovri.

4. Jarraporto, jarkalkulo

La jarkalkulo preskaŭ pretas kaj Anne Karin baldaŭ sendos ĝin al la estraranoj por trarigardo. La jarraporton ni ne traktis nun dum la foresto de la sekretario, sed venontfoje ni devos finpretigi ĝin !

5. Laborplano

La komitato, kies tasko estis ellabori proponon por la estraro pri nova laborplano, mem prezentos ĝin en Norvega Esperantisto. Ili jam finis la laboron pri ĝi, kaj sendis la rezulton al la estraro pasintjare, kaj ni apogas tiun ĉi pli simplan laborplanon, kiu anstataŭigos ankaŭ strategian planon.

6. Eides Språksjov en NRK

Ni gratulas al Ulf Lunde pri eminenta kaj kuraĝa partopreno en la programo ! Verŝajne la plej sukcesa reklamo pri Esperanto en la ŝtata televido iam ajn. Ankaŭ la prezentita kanto tre bone kongruis kaj ŝajne havis bonegan efikon. Herman konservas la programeron kiel vid-dosieron.

7. Skandinava kunlaboro

Mario havis skajp-kunvenon kun gvidantoj de la sveda kaj dana Esperanto asocioj, Ann-Louise Åkerlund kaj Peter Wraae, sabate la 18-an de februaro. Ni interkonsentis regule interkonsiliĝi kaj fortigi la kunlaboron inter niaj asocioj. Iu interesa projekto estas nova skandinava kongreso en 2018 (100 jarojn post la unua en Gotenburgo), kiam la tri asocioj povus kunveni, kune ekskursi kaj konatiĝi dum ŝipveturo inter Kopenhago kaj Oslo.

8. Eventualaĵoj

A. Propono pri KER-ekzameno

Katalin Kováts el edukado.net kontaktis la oficejon por instigi norvegojn fari KER-ekzamenon. Ni certe estas tre pozitivaj pri tiu peto, sed ni devus havi pli da informoj pri la enhavo kaj okazigo de tiaj ekzamenoj antaŭ provi trovi eblaj kandidatojn.

B. Poŝta rabato por sendi 200 ekzemplerojn da membrogazeto

La redaktoro opinias, ke ni devus sendi minimume 200 ekzemplerojn da membrogazeto por ekhavi rabaton, kaj tio kostus tiel malpli ol se ni sendus nur 150 ekzemplerojn por la membroj. Ni fidas al la redaktoro, ke li trovos la plej malmultekostan kaj optimalan solvon pri dissendado de Norvega Esperantisto.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30 - 20:26

La venonta interkonsiliĝo okazos la 30-an de marto 2017.

Raportis Mario Machlik